Amazono

La Amazono de Sudameriko estas unu el la du plej grandaj riveroj en la mondo. Ĝi havas la plej grandan kvanton da akvo fluanta. La rivero fluas de la Andoj (Nevado Mismi aŭ Nevado Quehuisha) tra la amazona pluvarbaro en la Atlantikon.

Amazono trafluas la landojn Peruo kaj Brazilo. La nomon Amazono ĝi portas en Peruo kaj en orienta Brazilo, sed la intera parto nomiĝas Rio Solimões.

Partoj de la Amazona baseno troviĝas en jenaj landoj: Brazilo (62,4 %), Peruo (16,3 %), Bolivio (12,0 %), Kolombio (6,3 %) kaj Ekvadoro (2,1 %).

Ĉar la longeco de riveroj estas malfacile mezurebla kaj krome dependas de la difino de "la" fonto, la longeco de Amazono estas indikata varie inter ĉ. 6 500 kaj 7 000 kilometroj. Ĝiaj fonto-riveroj estas malpli ol 200 km de la pacifika bordo, tamen ĝi trafluas preskaŭ la tutan larĝon de Sudameriko por atingi Atlantikon.

Tiu rivero sendas al la maro la kvinonon de la rivera akvo el la tuta mondo, tio estas 160 milionoj da litroj ĉiun sekundon.

La riverfino estas ĉe la ekvatoro.

La plej granda urbo ĉe Amazono estas la brazila urbo Manaus, ĉe la enfluejo de Rio Negro.

La unuaj eŭropanoj kiuj malkovris la riveron estis la malgranda trupo gvidita de la konkeranto Francisco de Orellana, kiu navigis preskaŭ la tutan riveron en 1541 kaj 1542 kaj alvenis al la enfluejo post unu el la plej mirigaj aventuroj de la historio. Dum tiu vojaĝo ili estis atakitaj de grupo de indianoj ŝajne konsistanta el virinoj, kio rememorigis ilin pri la legendo de la amazonoj, pro kio la rivero ricevis sian nunan internacian nomon.

En 1996 la pola esploristo Jacek Palkiewicz malkovris la fonton de Quehuisha (antaŭe oni lokigis ĝin ĉe Mismi) kaj nur en 2008 ĝi estis agnoskita de la Sociedad Geográfica de Lima.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Amazono_(rivero)